

Kuba prezidento Díaz-Canel vizitas sidejon de Google en Nov-Jorko



Nov-Jorko, 25 sept (RHK) En la sidejo de Google en Nov-Jorko, la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel elstarigis la potencialojn de homaj rimedoj kiujn posedas Kubo por avanci en la teknologia branĉo.

La renkontiĝon oni taksis informa kaj fruktodona. Ĝin partoprenis estraranoj de kelkaj usonaj kompanioj de la teknologia sektoro pri informado kaj komunikado, kiuj montris al la kuba prezidento sian interesiĝon pri la potencialoj de la kuba merkato samkiel pri la perspektivoj evoluigaj de la insulo.

Invitite de Eric Shmidt, vicprezidanto de Alphabet, la insula ĝustatestro dialogis kun la ĝeestantoj pri la evoluigo de altrangaj teknologioj kaj ties rolo en la progreso de la evolulandoj. Samtempe, li aludis la defiojn ĝirkaŝajn al tiuj teknologiaj progresoj kaj ties uzo en mondo pli kaj pli malegala.

Dum la kunsido, Díaz-Canel eslarigis ke la informadikiĝo de la socio konsistigas prioritaton de la kuba registaro. Li ankaŭ emfazis ke la sieĝo ekonomia de Usono estas la ĝefa obstaklo por evoluigi tiun ĝi branĉon je ties plej alta nivelo.

La prezidento priparolis la valoran potencialon de homaj rimedoj de la insulo, kio kialigas tiun ?i renkonti?on, kaj elstarigis la ?ancojn kiuj malfermi?as en sektoroj de la avangardaj teknologioj kiel bioteknologio.

La kunsidon ?eestis, iliaflanke, la ?efaj estraranoj de Google, VaynerMedia, Connectify, Mapbox, Mckinsey and Company, Virgin Group, AirBnB, Revolution, Twitter, Microsoft, Bloomberg, kaj Cresta.

Flanke de la insulo, akompanis la prezidento Díaz-Canel, Bruno Rodríguez Parrilla, ministro pri eksteraj rilatoj; Rodrigo Malmierca Díaz, ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj; kaj Jorge Luis Perdomo Di-Lella, ministro de komunikado.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/172367-kuba-prezidento-diaz-canel-vizitas-sidejon-de-google-en-nov-jorko>



Radio Habana Cuba